

Esperanto *en Skotlando*

Esperanto in Scotland – Esperanto ann an Alba
Printempo 2014 – £2.50/€3



Unua Tutkelta Kongreso
Pitlochry 6.-11. junio 2014

Ankaŭ en ĉi tiu numero: “Amo kaj Dediĉo” de Hju Rid; Esperanta propono al la Skota Parlamento , Pitlochry 2014 kaj multo pli ...

Esperanto en Skotlando

Numero 200 – Printempo 2014 – ISSN 0014-0643

Redaktoro: Ed Robertson

Helpredaktoro: Hju Rid

Administranto: Mia Casey

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw View,
Edinburgh, EH4 2QP

Telefono: 07970 156549

Rete: ed.robertson@esperanto.org.uk

La redakcio bonvenigas kontribuajojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de **Esperanto en Skotlando**: 1a de majo 2014. Oni sendu kontribuajojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer (senpage havebla de la koncerna retejo). Dokumentoj en la formato Word ankaŭ estos akceptataj. Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj.

Enhavo

Hju RID: Amo kaj dediĉo	5
Simon VARWELL/Ed ROBERTSON: A role for Esperanto in foreign language learning	14
109a Skota kongreso de Esperanto/Unua Tutkelta Kongreso de Esperanto, Pitlochry	22
Ed ROBERTSON: Kosmopolitaj Notoj	26
Reviews: Green supernova in a night sky	33
A Fundamento doesn't make a language	36
El la redakcia rubujo	38
Kalendaro de venontaj eventoj	40

La opinioj esprimitaj en **Esperanto en Skotlando** ne nepre kongruas kun tiuj de **Esperanto en Skotlando** aŭ EAS. **Esperanto en Skotlando** estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando

Prezidanto: David Hannah

Vic-Prezidanto: Mia Casey

Sekretario: David Bisset

Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,
Motherwell, ML1 3AP.

Telefono: 01698 263 199

Rete: secretary@skotlando.org

El katedro



Redaktora Komento

Grundtvig-Projektoj

Esperanto-Asocio de Skotlando nun involviĝis en du projektoj kun internaciaj esperantaj partneroj subvenciataj de la Grundtvig-programo de la Eŭropa Unio. La programo faciligas al organizoj kiaj nia asocio kunligi kun similaj partneraj organizoj en aliaj landoj de la EU, kaj kunveni por seminarioj en kiuj ni dividas informon kaj starigas trejnadon pri diversaj lertoj. Mi ĉeestis unu tian renkontiĝon en la itala urbo Trieste pasintan oktobron por la Grundtvig-iniciato "elloke-tutmonden", angle "from the local to the global" kaj renkontiĝis kun kvin partneraj organizoj el Italio (2), Litovio, Pollando, kaj Francio.



Nia semajnfina aranĝo konsistis el sesioj por ke konatiĝu ĉiu organizo kun la aliaj, kaj laborsesioj pri nia renkontiĝo-temo "Sociaj retoj, retaj iloj por organizoj", en kiuj spertuloj pri la koncerna socia medio faris lernad-prezenton pri iloj kiaj Google-Grupoj/Enketiloj/Drive/Kalendaro/Hangouts, Dropbox, Facebook, Twitter, LinkedIn, Skype, kaj Doodle, kaj kiel uzi ilin plej efike por la organizaj kaj varbaj celoj de niaj organizoj. Tamen, restis tempo ankaŭ por ĝui la lokajn kulturon kaj pejzaĝon de niaj gastigantoj. La alia partnerado en kiu partoprenas EAS rilatas al "Volontulado kiel persona pluevoluiĝo: kiel pliboniĝi?" kaj ĝia unua renkontiĝo okazis kiel parto de la Junulara E-Semajno en Szczawno-Zdrój en Pollando dum la novjara feria periodo. Ĉiu projektpartnero respondecas pri po unu renkontiĝo kaj sendas reprezentantojn al la renkontiĝoj de la partneroj. Se interesus al vi viziti alian landon (kun ĉiuj viaj elspezoj pagitaj de la projekto ☺) por reprezenti EAS en renkontiĝo, kontaktu al: Francesco Maurelli (fran.mau@gmail.com).

Ed ROBERTSON

Abonilo

ESPERANTO-ASOCIO DE SKOTLANDO (EAS)

Kotizo al EAS / abono al "Esperanto en Skotlando" por 2014:

Dankon pro via ĝisnuna fidela subteno. La jarabono komenciĝas en januaro ĉiujare. Plene pagitaj membroj de EAS ricevas "Esperanto en Skotlando" kaj la "Scottish Esperanto Bulletin" senpage.

Sendu al: Membreca Sekretariino S-ino M. Casey, 9 Flora Gardens, Bishopbriggs, Glasgow, G64 1DS



Elektu kaj indiku la kategorion

Kotizo al EAS kaj senpage ricevo de la gazetoj	£10/€12
Ne-membro en Britio kiu abonas nur al EeS	£6/€7
Ne-membro en alia lando	£10/€12
Ekstra jarabono de EeS al la sama adreso	£5/€6
Studento	senpage

Donaco al Esperanto-Asocio de Skotlando

Totala sumo

Nomo

Adreso

.....

Poŝtkodo

Telefono

Resendu ĉi tiun folion (aŭ kopion), kune kun via pago. Se pagante per £ pagu ĉeke al la adreso sube; ekzistantaj abonantoj kiuj ne havas adresŝanĝon povas simple sendi la ĉekon – ne necesas replenigi la formularon. Ĉekoj estas pagendaj al: "Scottish Esperanto Association". Se pagante per €, vi povas pagi kontantan monon (ne ĉekojn) rekte al la adreso sube, aŭ alternative vi povas pagi en nian UEA-konton **eask-I** kaj sendi al ni la formularon, indikante ke vi jam pagis en nian UEA-konton. Bv. noti ke kvitancoj ne sendiĝos ĝis la sekvanta numero de **Esperanto en Skotlando** eldoniĝas.

Amo kaj Dediĉo

"Ŝi akceptindas."

"Akceptindas? Ŝi estas nekredebla."

"Ŝi ŝatas vin."

"Ne moku."

"Ni testu?"

Riko ridis. Johano aludis al ilia elimina testo, proceduro de.

"Ne. Lasu."

"Vi timas."

"Ne."

"Nu estas mia aĉetvico. Vi ne havas elekton. Donu al mi vian glason."

Riko donis sian bierglason, kaj Johano, por eviti la dancantojn en la ĉambrocentro, iris ĉirkaŭ la ĉambro al la trinkservejo. Li teksumis sin inter grupoj de viroj, brakoj krucitaj, kiuj staris rigardantaj la dancejon, ĉiu kun bierglaso en unu mano subportata de la angulo de la alia kubuto. Riko rigardis la blondulinon, babilantan dum ŝi dancis. Se ŝi rigardus scianta ke Johano ne ĉeestas, ne estus Johano kiun ŝi ŝatas – per elimino. Li rigardis ŝin rideti feliĉe kaj ridi kun la amikino. Tiam li vidis ŝin rigardi liadirekten, kaj poste returni sin al la amikino. Sekundojn poste ŝi rigardis rekte al li, kun trankvila aspekto je la vizaĝo. Merdo! Ridetu nun, li pensis. Merdo! Li devigis sin streĉi la lipojn. Ŝi reagis tuj, per larĝa rideto, kiu montris ŝiajn perfekte blankajn, perfekte belegajn dentojn. Ŝi tenis lian rigardon, ankoraŭ ridetanta. Li deturnis la okulojn.

Johano revenis post minutoj.

"Kiu pravis?"

"Enordo."

"Diru."

"Vi pravis."

"Ne. Diru: 'Johano pravis. Johano ĉiam pravas!'"

Riko levis brovon.

"Ni dancu?" diris Johano.

Ili metis la bierojn sur tablon kaj iris al la du knabinoj. La blondulino vidis ilin veni, kaj parolis al la amikino. Kiam ili alvenis la amikino turnis sin al Johano – en la momento kiam la muziko haltis. Damne! Tio ĉi estas embarasa.

"Ĉu vi volus la sekvan?" diri Riko al la blondulino.

"Kompreneble," ŝi diris ridetante.

La diskestro, ĝene, perdis la lokon. Li balbutis sence dum li serĉis la sekvan trakon. La maloportuna erareto ŝajnis etendiĝi en minutojn. Riko turnis sin al la knabino kaj ridetis. Ŝi ridetis al li.

"Kio estas via nomo?"

"Sophie," ŝi diris.

La akĉento ŝajnis franca. Li sentis eksciteton pro la maniero per kiu ŝi plilongigis la duan silabon de sia nomo. Tiam, bezonante helpon, li ekrigardis flanken, sed Johano estis jam ĉe la trinkservejo kun la amikino de Sophie, kaj aĉetis por ŝi trinkon.

"Mi estas Riko. Tiu estas Johano."

"Tiu estas Angela."

"Angela."

Ili daŭre ridetis. Li ne volis diri, ĉar ĝi estis tiel kliŝa, sed li ne povis pensi ion alian por diri. "Kiel vi okupas vin?" kaj la dolĉa konversacio komenciĝis. Des pli dolĉa ĉar ŝi ne montris kiajn ajn deziron esti aliloke, kaj ŝajnis tute kontenta stari apud li. Ŝi diris ke ŝi estas studento de la angla el Marseilles. Ŝi instruas en la lernejo Lawside. Ŝi aĝas je dudek unu. Ŝi tre ŝatas la lernantojn sed miris ke ilia kapablo en la franca estas malforta.

La muziko rekomenciĝis kaj ili dancis du dancojn. Je la fino de la dua li ekhavis ŝian numeron.

Riko jam laboris por Organek dum ses monatoj kiam li renkontis Sophie. Li estis jam feliĉa tiun vesperon. Lia estro, pli frue en la tago, proponis al li ekscitan novan projekton: farindeca studo pri surbretigitaj produktoj. Ĝorĝo Radcliffe vokis Rikon en sian oficejon. Li diris ke la kompanio estas tre kontenta pri lia laboratoria laboro, kaj eĉ pli lia kompreno pri teoretiko de drogoj kaj ties aplikoj. La estroj volas ke li gvidu malgrandan propran projekton.

"Jen aro de raportoj kaj laboratoria taglibro. Ili apartenis al Vilĉjo Simington, kiu emeritiĝis antaŭ pluraj jaroj," diris Ĝorĝo, "Ili subtenadis bretan polvon, sed ni opinias ke eble oro troviĝis ene."

Li donis al Riko ringobindilon kaj nigran kartonkovritan notlibron.

"Vilĉjo kolketis raportojn pri drogoj super kiuj li laboris dum la jaroj, tiuj kiuj neniam atingis merkaton. La plejmulto ne havis komercan valoron, sed oni jam plene testis ilin. Ili ĝenerale estas sendanĝeraj; iajn flankefikojn oni notis en la raportoj."

"Kiel oni permesis lin testi nevendeblajn drogojn?"

"Ha! Tiaj tagoj estis aliaj, Riko. Ni posedis pli grandajn buĝetojn, kaj organulojn, kiaj Vilĉjo, oni regis pli libere ol hodiaŭ. Sed li laboris konscience kaj faris provojn laŭ modernaj kriterioj; li insistis pri p-valoroj je komo nulo nulo unu."

"Kiaj estis tiuj ĉi drogoj? Kiaj efikoj?"

"Hm, mi pensu. Nu, estis unu – Fideipidem, mi opinias – kiu kuracas ateismon. Nenia vendeblo por tia hodiaŭ."

"Ĉu vere?"

"Mi kredas ke jes – nenia kalemburo – ĝi liveras al homoj kredemon. Nu, ĉu interesas vin?"

"Jes. Komprenoble."

"Enorde. Ni serĉas kion ajn. Patologio multe progresis ekde la tagoj de Vilĉjo; iuj el tiuj drogoj povus esti utilaj nun; esploru kombinojn; esploru mildigajn efikoj al hodiaŭaj drogoj; kaj pensu preter maslano. Vi komprenas, sendube. Kaj se vi ja trovos ion, via kariero en Organek akceliĝos."

Riko daŭre ridetis dum li kuŝis en la lito la vesperon post la renkonto kun Sophie. Ĉi-foje, mi petas, pensis li. Neniaj pliaj seniluziigoj. Mi petas, ho Dio. Li krucosignis sin kaj komencis preĝojn. Unu Patro Nia, unu Ave Maria, kaj unu Gloro Al. Tiuj tri, kaj silenta konversacio, estadis rutino ekde infanaĝo. Li preĝis kaj li kredis pri Dio. Li kredis, jes, li kredis. Li sekvis fidele la instruojn de la Eklezio. Por li, ili estis tiel memevidentaj. Ekde akcepto de la vereco de la Evangelioj, ĉio cetera sekvis. Sed estis precize tiuj ĉi instruoj kiuj malfermis faŭlton ĉagrenigan en lia vivo. Kiel trovi katolikan virinon. Almenaŭ, virinon, kiu allogis lin. Tio gravis, ĉu ne? Kaj iun kun kiu li povus paroli. Kara Jezuo, iun kun kiu li povus paroli.

Li preĝadis ĉi-teme kiam li komencis universitatajn studojn, sensukcese ĝis nun. Tiu doloriga fakto kaŭzis al li scivoli ĉu okazas mesaĝo. Ĉu Dio gvidas lin en iom timigan direkton? Ĉu li devas fariĝi pastro? Li ne malŝatus pastran karieron. Li povus imagi sin en la okupo. Celebrado de Meso. Vizitoj al paroĥanoj. Aŭdado de konfesoj. Li ĝuus prediki kaj babili kun homoj. Sed fraŭleco, ĉu vere, Dio? Ĉu tion vi ja deziras? Ĉu tiel alvokiĝo montras sin?

Nu, li atakis jam tiun demandon. Morgaŭ li vizitos la episkopon. Sed ĉi-vespere li renkontis Sophie. Nekredebla, amorinda, inteligenta. Li posedis ŝian numeron kaj, damne jes, li telefonos ŝin. Sed li sciis ne esperi tro frue. Do, mi petas, Dio, neniaj pliaj seniluziigoj. En la nomo de la Patro, kaj de la Filo, kaj de la Sankta Spirito. Amen.

Riko sidis en la salono de la domo de la episkopo, atendante kafon kiun tiu portos. Li scivolis kial, entute, li faris tiun ĉi aranĝon. Plaĉas al li virinoj; li havis koramikinojn. Tamen, neniun, ĝis nun, estis edzinigindaj, almenaŭ ne laŭ liaj kriterioj, ne ĝis hieraŭ.

"Jen, via kafo," diris Episkopo Stefano Galloway kaj metis tason kun subtaso sur la tablon antaŭ Riko. "Diru al mi pri vi mem; via laboro, via vivo, amikoj, kaj tiel plu, kion pensadis vi.

Hodiaŭ ni nur babilas, kompreneble; neniuj decidoj, absolute neniuj."

Do Riko parolis pri si mem. Finfine li eldiris. Li ankoraŭ ne renkontis la virinon de siaj revoj. Ĉiuj koramikinoj de la universitataj tagoj estis militemaj ateistoj; la virinoj kiujn li renkontis en la paroĥo estis, ni honestu, seninteresaj.

"Do, pri via laboro?" diris la Episkopo.

"Mi ĝuas ĝin; ĝi estas fascina. Sed, mi pensas ke mi ŝatus labori pli kun homoj; mi ne certas."

"Pastreco certe donus tion al vi. Sed ankaŭ aliaj alvokiĝoj donus."

"Sed pastreco estas speciala."

"Vere. Ĝi havas gloron. Ĉu tio allogas? Tio ne estas malbona, kompreneble, sed la laboro enhavas multon sengloran. Nu, ĉiukaze, ĉu vi havas koramikinon nun?"

"Ne," diris Riko. Tio veris laŭdetale, sed li sentis la orelojn bruliĝi.

"Ĉu vi preĝas al Nia Sinjorino?"

"Unu Ave vespere."

"Ĉu vi povus rosarion?"

"Ja, kompreneble."

"Enorde. Ni lasu aferojn tiel dum, ni diru, ses monatoj? Daŭru en via laboro kvazaŭ vi intencas resti en ĝi. Se vi renkontus iun inan, nur sekvu vian instinkton; ne permesu ke tiu ĉi konversacio ŝanĝu kion ajn. Nur estu vi mem; kaj mi vidos vin post ses monatoj!"

Sophie kaj Riko fariĝadis paro. Li telefonis al ŝi tuj post la renkonto kun la episkopo, kaj pardonpetis ke, voki ŝin la sekvan tagon ŝajnigis lin tro entuziasma. Sed ŝi ĝojis.

"Mi ne kredas tiel," ŝi diris, "Plaĉas al mi montri kion oni sentas. Kial homoj ludu ion, ian ludon?"

Ŝi parolis en bona sed ne perfekta angla. Riko ridetis feliĉe. Ŝi misprononcis la anglan "th". Riko sentis plaĉan ĝuon pro ŝia provo. Li daŭris ridete, tutsola en sia apartamento, dum li babiladis en stultan blindan telefonaparaton. Finfine li petis ŝin.

"Ĉu plaĉus al vi akompani min al la kinejo ĉi-vespere?"

"Jes, kompreneble, tre plaĉus."

Ili intervidadis unu la alian ne tre longe antaŭ ol frapis seniluziiĝo. Sophie ne estis kredanto.

"Mi lernis ĝin en la lernejo, tiun ĉi religion," ŝi diris. Ili sidis en la sofo en lia apartamento, man-en-mane, proksima unu al la alia. "Sed ĝi ne havas sencon por mi. Miaj gepatroj, vidu, estas ambaŭ sciencistoj. Mi lernas de ili ke religio ne estas racia."

"Mi scias, mi scias. Sed ĝi havas sencon por mi. Se vi kredas la Bibliion, ĝi enhavas sencon."

"Mi ne kredas la Bibliion. Mi ne povas. Ĉu vi ĉesos ŝati min?"

"Ho ne! Mi ankoraŭ ŝatas vin. Ho, jes, kompreneble. Mi ŝatas vin tre multe, tre tre multe."

Li ne mensogis. Sophie estis revo. Li ne povus deziri ion plian en virino, krom kredemon. Li plene konsciis ke lia insistado venis de la Eklezio. Sed la Eklezio malstreĉiĝis iomete ekde Vatikano II. Oni permesus miksitajn geedziĝojn pli facile nun. Tamen, tiu ĉi ĉikaneto, tiu ĉi sento de malperfekto, tiu ĉi sablero en la okulo. Kial estas ĉiam tiel?

La projekto en Organek fascinis lin. Li havis liberon larĝigi siajn esplorojn preter kuraco de malsanoj kaj kovris multajn drogoklasojn. La tasko estis grandega sed li adoptis frue metodologion kiu helpis lin progresi tra la granda kolekto de drogo de Vilĉjo dum samtempe reteni spuron de eblecoj. Li esploris uzajn matene kiam la menso estis pli lerta, kaj legis la dosieron de Simington en la posttagmezo.

Li revenis al la fabriko unu posttagmezon. Li renkontis Sophie por lunĉi. Tiun tagon okazis lerneja ferio, kaj ŝi havis libertempon. Kiam ili forlasis la kafejon ŝi kisis lin milde sur la lipojn, kio kaŭzis al li ke reiro al laboro fariĝis malpli alloga.

Li malfermis la ringobindilon je la loko kiun li markis hieraŭ. La registro titoliĝis jene

SCN: 93647/5

Nomo: FIDEIPIDEM

Klaso: Hipnotilo

Efiko(j): Induktas kaj/aŭ aktivigas spiritan kredemon

Efikopovo: 50% de subjektoj raportas malaperon de antaŭaj obstakloj pri kredo rilate supernaturajn fenomenojn ene de 12 horoj de dono. Ceteraj raportas nenian rimarkeblan efikon.

Daŭro: Ene de periodo de homaj eksperimentoj (13 monatoj) ĉiuj pozitivaj volontuloj retenis efikon sen rimarkebla redukto. Negativaj subjektoj raportas nenian ŝanĝiĝon.

Sekureco: neniam raportitaj flankefikoj.

Mekanismo: Necerta je tempo de esploro. Supozate: anatomie specifa neŭrotransdonilo.

Postlabore tiun vesperon Riko kaj Johano portis bierojn en kvietan angulon de la trinkejo Speedwell, kaj sidiĝis.

"Ĉu vi fike frenezas?" diris Johano, "Kio se oni priserĉis vin?"

"Oni ne. Nur pri narkotaĵoj, sed neniam pri la drogoj de Simington."

"Vi tamen estas idioto. Ĉu scias Sophie?"

"Ankoraŭ ne, sed mi diros al ŝi."

"Damninde certe vi diros. Se mi iam malkovris ke vi subdonis ĝin al ŝi, mi frakasus vian diablan kolon."

"Trankviliĝu, Johano! Kion vi pensas pri mi?"

"Okej, okej, okej."

"Tio ĉi gravas al mi. Se ĝi efikus, estus pli facile edziĝi kun ŝi. Mi deziras edzinigi ŝin; ŝi estas perfekta."

"Perfekta krom tio ke ŝi ne kredas pri la katolika Eklezio."

"Ne, ŝi ne kredas. Vidu, ĝi estas familia situacio. Ili ĉiuj geedziĝis kun katolikanoj. Ĉiuj."

"Kaj vi deziras edzinigi ŝin?"

"Jes."

Sophie tenis la malgrandan kapsulon inter polekso kaj fingro. Ŝi rigardis al Riko super la mano. Ŝi ridetis.

"Tiu ĉi igos min kredi?"

"Ŝanco po kvindek el cento."

"Kaj sendanĝeras?"

"Cent centone."

"Kaj vi ŝatos min pli se mi kredos?"

"Ho, Sophie, mi ne povus pli ŝati vin. Mi plene enamiĝis al vi."

Ŝi klinis sin kaj kisis liajn lipojn.

"Mi ankaŭ plene enamiĝis kun vi."

"Vi ne devas preni ĝin. Mi ne petis vin. Mi nur diris al vi, kion raportis la dosiero."

"Kaj se mi ne prenos, ĉu vi ankoraŭ amos min?"

"Mi ne povus ne ami vin."

"Kaj se ĝi ne efikos?"

"Mi ankoraŭ amos vin same."

"Do kial?"

"Kial? Ĉar estus pli facile, pli facile en nia ... pli facile se vi venus kun mi al la preĝejo, nur tio."

"Hej, drogo ne povas fari tion ĉi," diris Sophie, kaj ŝi ĵetis la kapsulon en sian buŝon. Ŝi levis glason al la lipoj, kaj tralavis la kapsulon per ruĝa vino.

La sekva tago estis Dimanĉo kaj, dum Riko pretigis sin por piediri al Meso dek-unu-hora, la pordosonorilo bruis. Jen Sophie. Ŝi surportis sian plej bonan grizan jupon, kremkoloran bluzon, kaj bluan jakon. Ŝi portis leĝeran lipŝminkon, ne tro evidentan, sed sufiĉan por ne aspekti malformala. Ŝi ridetis al Riko.

"Mi venas ankaŭ."

"Enordo. Du minutojn, kaj mi pretos."

Kapoj turniĝis en la romkatolika preĝejo Sankta Josefo je la Meso dek-unu-hora kiam Riko okupis seĝon fiere akompanata de

Sophie. Ili sidis proksime unu al la alia tutdume, kaj li helpis ŝin pri la respondoj per indiko de la loko en lia meslibro. Li ne povis ne fojfoje rigardi ŝin, ŝian belan vizaĝon, vere ĉeestantan dum la Meso kun li. Ŝi ridetis al li ĉiun fojon.

"Ĉu vi fariĝos mia edzino?" li diris kiam li senrubigis la tablon post lunĉo.

Ŝi ekploris.

"Mi pardonpetas. Ĉu mi eraris demandi? Ĉu tro frue? Estas tro frue."

"Ne, ne, ne. Ne estas tro frue. Jes, mi diras jes."

"Ho, dank' al Dio. Dank' al. Sed kial larmoj?"

"Mi timis ke vi ne petos al mi."

"Sed vi sciis ke mi petos. Mi amas vin."

"Tio estis antaŭe, antaŭ ĉi-drogo. Ĝi efikis. Mi kredas nun. Mi kredas je Dio, kaj hieraŭ mi ne kredis. Hieraŭ mi opiniis ke kredo estas senracia kaj hodiaŭ mi kredas. Ĉi-matene, en la Meso, mi feliĉis. Mi estas nun feliĉa. Mi feliĉas kredi. Sed mi ne povas ne kredi. Mi ne pensas ke mi povos esti kiel mi estadis. Kaj mi tiom timis esti ĉi tiel sen vi."

Li stariĝis kaj iris ĉirkaŭ la tablo al ŝi. Ŝi stariĝis por renkonti lin. Ili brakumis kaj kisis malrapide.

En la vespero li akompanis Sophie al ŝia apartamento kaj promenis hejmen. Li dankis Dion kaj la Virgulinon pro la miraklo. Tio ĉi devas esti la respondo al la multaj jaroj da preĝado kaj la ĵusaj monatoj de sindediĉo al Maria, per liaj ĉiutagaj rosarioj. Li nun havis la virinon de siaj revoj, kaj ili geedziĝos. Li enspiris profunde kaj suspiris. Tiam, je la fino de la suspiro, li sentis la etan ĉikanan dubeton, sen kialo, neklarigeblan, nur etan dubigan jukon.

Hju RID

A role for Esperanto in foreign language learning

*This paper was originally prepared and submitted by Ed Robertson and Simon Varwell, as the "Scottish Esperanto Education Group" to the Scottish Parliament European and External Relations Committee Inquiry on learning foreign languages in primary schools in February 2013. Angela Tellier also helped in the preparation of the paper. The format of the report has been slightly changed to fit in with the usual style of **Esperanto en Skotlando**.*

This submission brings to the committee's attention the educational value of the easy-to-learn international language Esperanto – not as a means of advancing Esperanto itself, but because of its value as a gateway to learning other languages.

Drawing upon a very successful pilot project of teaching Esperanto in English primary schools, this submission, prepared in consultation with Angela Tellier who has been heavily involved in the development of that project, comes from individual speakers of Esperanto who support the idea of Esperanto as a bridge to successfully learning other foreign languages, not as a means in itself.

GATEWAY LANGUAGES

Observers of the Scottish educational system will be already well aware of the value of learning languages as gateways to other languages. There are two primary examples of this that have been successful in the country's history of education.

Latin – the Latin language has had a great value in the Scottish educational system, for a number of reasons:

a) Its similarity with other major European languages – those who have learned Latin in school will invariably find many elements of other European and world languages very familiar. Latin has long been a good basis for an English speaker to then successfully learn other Romance languages such as French, Spanish or Italian.

b) Its access to advanced English – a learner of Latin will be considerably aided in the comprehension and use of advanced English, not least in a number of technical and scientific spheres such as medicine, law and biology where much terminology is derived from Latin.

Gaelic – the cultural and linguistic value of Gaelic has long been recognised as of important value in the Scottish primary school sector. This is due to:

a) A cultural and linguistic value related to the inherent good that comes from protecting, promoting and advancing the Gaelic language not just in its natural homeland but throughout the whole of Scotland.

b) An inherent value that is found in an early primary years language that Gaelic provides as a useful foundation for learning other languages. That is, there is value in Gaelic medium education and other opportunities to learn Gaelic in school not only because of its inherent value as Gaelic but in its broader value as simply another language of instruction and learning and as a means to understanding the nature of language in general. It has long been advocated, for instance, that Gaelic gives a significant advantage to primary school pupils not only in learning a third or fourth language but even in the comprehension of the mechanics of the English language itself.

Therefore, it is long recognised that learning other languages, whether those connected to other world languages or those connected to the very essence of Scottish culture and identity, have a huge value not only in themselves but in providing a gateway or bridge to the learning of other world languages and in the understanding of English. (Note: The rationale behind the teaching of Gaelic is explained in detail here: <http://www.gaidhlig.org.uk/fdp/en/frequently-asked-questions.php>)

THE VALUE OF ESPERANTO

Esperanto is an international language founded in the late 1800s as an instrument of simple, easy-to-learn communication. It was intended that the language should form a highly accessible and

culturally neutral bridge between speakers of different world languages (1). The number of active speakers of Esperanto has been estimated to be around three hundred thousand throughout the world. It is characterised by two main features:

1. A strong connection with the major European languages. The vocabulary of Esperanto was specifically designed to be familiar to speakers of Romance and Germanic languages – those tongues deemed at the time to be most widely recognisable throughout the world. Words in Esperanto are heavily drawn from English, French, German and Latin, and much of its vocabulary will be familiar to speakers of those languages.

2. A very regular grammar and minimal rules to govern the use of the language. The language was designed with little more than a dozen key grammatical rules, to which there are no exceptions. For instance, all verbs are regular, all nouns end in “o” and all adjectives end in “a”. This means that once a learner acquires a basic ability – for instance to change the tense of a verb or the situation of a noun – they can be assured that the rule behind the ability will face no exceptions, and they can with exponential success apply the language with relative ease.

2.2 As such, a new English-speaking learner of the language can acquire a familiarity with the basic rules of the language in a matter of just a few hours, compared to a significantly longer time of the historically widespread “gateway” language Latin.

2.3 The advantage of Esperanto in this context is that a learner can focus on learning the mechanics of a language – such as the nature of verbs, nouns and adjectives, or the role of grammatical cases – without being distracted by the often complex and irregular individual examples that other languages contain.

2.4 This provides a strong foundation not simply for proficiency in Esperanto but more importantly for successfully tackling further national languages such as French, Spanish or German because the knowledge of the basic mechanics of language learning has been so quickly acquired.

3. SPRINGBOARD TO LANGUAGES

3.1 Since 2006, Esperanto has been used in a small number of primary schools in England and the Isle of Man as a so-called “springboard” language. The idea has not been to teach pupils Esperanto because of any inherent value in producing Esperanto speakers, but because of the enhanced ability pupils will have in learning more widely-spoken world languages such as French, Spanish or German.

3.2 A common metaphor used by the Springboard to Languages project is that of the role of the recorder in music. Music teachers do not teach the recorder to primary school pupils because there is a national commitment to creating a nation of recorder players (even if there may be value in this) – they do so because the recorder is a cheap, easy and simple way of producing instruments through which pupils can learn basic musical concepts such as tones, scales, notes and melodies. Pupils who learn the recorder will then go on to be more successful at learning other more complex instruments than if they had simply started out with that other instrument from scratch.

3.3 The metaphor can also extend to Latin. As explained earlier in this report, Latin has historically been widespread in the Scottish school system – not to produce a nation of Latin speakers (again, even if there may be value in this) but because learning Latin will significantly aid the learning of French, Italian and other major European languages.

3.4 Similar foundations may be found in other areas of the curriculum. For instance, mathematics provides a useful foundation not for a nation of mathematicians but for a workforce well equipped for a range of science and engineering subjects.

3.5 The same is the case with Esperanto. Springboard to Languages has shown that learning Esperanto has a value not simply in creating a nation of Esperanto learners, but in creating a generation of school pupils who have increased language awareness, a strong motivation

to learn other languages, and a belief in themselves as good language learners.

"In short, we as teachers fail children by channelling them into learning a language of our choice, at an age when we should be helping them to acquire the tools that will allow them to learn a language of their choice confidently and independently as an older child or adult."

3.6 Given Esperanto is around ten times quicker to learn, that has a crucial impact on the time that it takes and the cost that it incurs. For example, a primary school teacher, whether a language teacher or not, could achieve an adequate foundation of knowledge for teaching Esperanto in primary schools within about 100 hours.

4. THE WAY FORWARD

4.1 In conclusion, Esperanto provides a financially and educationally sound basis for learning foreign – particularly European – languages. Because of its simple construction it provides not a distraction from learning other meaningful and globally useful languages, but rather an advantage to learning those languages which tomorrow's politicians and business people will need to know. In other words, it can contribute significantly to enhancing the learning of other globally useful languages.

4.2 Given that learning any second language – be it Gaelic, Latin, French or Esperanto – is proven to make the learning of a third language so much easier, the inquiry will be keen to contemplate the following question:

What language provides the best cost benefit analysis? In other words, what language delivers the best output in terms of numbers of competent speakers in return for a given amount of teaching resource?

In light of the figures cited in this report, Esperanto is the best candidate.

5. SUMMARY

5.1 To answer specific questions posed by the enquiry:

1. Is there enough funding for the Scottish Government's proposal (including use of EU money)?

The use of Esperanto as a gateway language and an emphasis on language awareness are ideal as an introduction to the learning of multiple languages, at minimal cost.

2. Do existing teachers have the skills and teaching resources available for language tuition? Are existing teachers and teaching assistants equipped to teach languages?

One of the main strengths of the approach we propose is the ease with which non-specialist teachers can begin teaching it effectively to classes within a short while after learning. Because the educational aim is how to learn a language, rather than the language itself, teachers can be up to speed very quickly.

3. Should there be more training and support for new and existing teachers for language teaching?

Clearly, yes, whatever other conclusions the committee comes to.

4. What is the capacity within the curriculum to accommodate greater language study? Can language learning be embedded in existing teaching?

Language awareness has multiple beneficial effects on learning and teaching in other areas of the curriculum.

5. The choice of languages for teaching – which languages should children be learning and why? The role of languages in economic development – what languages should children be learning to benefit their future careers, and to help Scotland flourish economically?

The key point is that the languages which will be useful to children in their future lives will be many and varied, as their lives progress and the world changes, and therefore the flexibility provided by teaching them language awareness is time well spent.

5.2 Esperanto, aside from any value in speaking the language in isolation, provides a strong, effective, successful quick and – above all – cheap introduction to languages. It allows learners not simply to derive a basic competence in a new tongue but to acquire an understanding of the mechanics of language and a foundation for learning other languages.

5.3 Research suggests that those who learn Esperanto first will be better speakers of French, Spanish, German, or indeed any other languages in the world, than those who go straight into that language.

5.4 A dilemma for this inquiry is that spending 100 hours with a pupil on any foreign language is invariably 100 hours not spent on a host of “competitor” languages. 100 hours of Esperanto, however, has the twin advantages of not only exponentially more progress in the language of Esperanto itself, but a significantly stronger foundation for learning those other key world languages that will be so important to Scotland’s economy in years to come.

5.5 This inquiry is rightly concerned with the direction of language teaching in Scotland’s primary schools. But besides the question “what languages do we teach?”, we urge consideration of another question first: “regardless of what languages we teach, what is the best foundation for starting that teaching?”

5.6 The authors of this submission would be happy to provide, on demand, a variety of further input to support this paper, including:

- Printed copies for all committee members of the research report of the Springboard to Languages project.
- Other research about the value of Esperanto as a gateway language.

- Verbal submissions to an inquiry hearing to reinforce this report and answer any arising questions.

Ed ROBERTSON and Simon VARWELL

Footnotes:

1. The multilingual site <http://www.lernu.net> provides a good introduction to Esperanto as a language.
2. "Esperanto sen Mitoj [Esperanto without Myths]", Ziko M. Sikosek, Antwerp, 2003.
3. A sample text here illustrates Esperanto's familiarity to an English speaker: http://en.wikipedia.org/wiki/Esperanto#Sample_text
4. A study at the University of Paderborn has suggested that 150 hours of study of Esperanto would be required to achieve the same standard as would require 1000 hours of study for Italian or another Romance language, 1500 hours for English or 2000 hours for German. Bruno Flochon, "L'espéranto", in Guy Gauthier (ed.), "Langues: une guerre à mort", Condé sur Noireau, 2000
5. <http://www.springboard2languages.org/home.htm>
6. "[F]indings from the past hundred years consistently point to the educational benefits that Esperanto can bring to children's ... L1 and ... L2 learning". Angela Tellier "Esperanto as a potential aid to language learning in primary schools" in "Esperanto as a starter language for child second-language learners in the primary school", ed. Angela Tellier, Barlaston, 2012.
7. "Esperanto as a starter language for child second-language learners in the primary school", ed. Angela Tellier, Barlaston, 2012.
8. <http://www.esperantoresearch.org.uk/publications/esperanto-starter-language-child-second-language-learners-primary-school>



*109a Skota Kongreso de Esperanto
kaj 1a Tutkelta Kongreso de Esperanto Pitlochry,
6a-11a de junio 2014*



Bonvenon al la 109a Skota Kongreso de Esperanto, la plej alta kongresnumero en Esperantio, ĉi-foje kune kun kaj samtempe kun la Unua Tutkelta Kongreso de Esperanto. Atendas vin bunta 5-taga programo de klerigaj kaj kulturaj eventoj, ekskursoj, seminarioj, manĝoj kaj kunestado.

- **Skota muziko, inkluzive sakŝalmiston**
- **Tradicia ceilidh kaj popoldancado**
- **Ekskursoj inkluzive en la altlandan montaron**
- **Lernu pri skotaj bieroj kaj viskioj ... kaj gustumu**
- **Ĝuu aŭtentikan skotan kuirarton**
- **Kongrestemo William Auld**
- **Prelegoj pri Keltaj historio kaj lingvoj**
- **Seminarioj pri organizaj lertoj**
- **Sorĉanta historiĉa ĉirkaŭaĵo en bela pejzaĝo**

Se vi ĉiam pripensis veni al Skotlando, 2014 estas intereseĝa jaro por via vizito, kun pasiaj debatoj pri la estonteco de la lando. **Venu!**

Kiel atingi al Pitlochry



Fervoje: De Aberdeen 11x tage ŝanĝo en Perth (daŭro 2h08-3h16); de Dundee 11x tage ŝanĝo en Perth (daŭro 0h56-1h55); de Edinburgo 10x tage rekte aŭ ŝanĝo en Perth (daŭro 1h41-2h13); de Glasgovo 11x tage rekte aŭ ŝanĝo en Perth (daŭro 1h32-1h51); de Inverness 11x tage rekte (daŭro 1h26-1h49). Detaloj ĉe: nationalrail.co.uk



Buse: Ĝenerale ne rekomendindas ĉar malpli da eblecoj, pli da ŝanĝoj, kaj malpli rapide. Proks. samkoste kiel trajne, krom por skotaj civitanoj super 60 j. kiuj veturas senpage. Detaloj ĉe: travelinescotland.com



Aere: Al Edinburgo rekte de Alicante, Amsterdam, Antalya, Athinai, Barcelona, Basel, Belfast, Bergen, Berlin, Béziers, Billund, Birmingham, Bologna, Bordeaux, Burgas, Bratislava, Bremen, Bristol, Bruxelles, Budapest, Cagliari, Cancún, Cardiff, Chambéry, Cork, Dalaman, Dublin, Dubrovnik, Düsseldorf, East Midlands, Exeter, Faro, Frankfurt, Fuerteventura, Gdańsk, Genève, Göteborg, Grenoble, Hamburg, Ibiza, Innsbruck, Isle of Man, Istanbul, Jersey, Katowice, Kaunas, Kerkyra, Kirkwall, Knock, København, Köln-Bonn, Kraków, La Rochelle, Lanzarote, Las Palmas, Lisboa, Łódź, London (ĉiuj flughavenoj), Lyon, Madrid, Málaga, Malta, Manchester, Memmingen, Menorca, Milano, München, Murcia, Napoli, New York, Newquay, Nice, Norwich, Olbia, Orlando, Oslo, Palma de Mallorca, Paphos, Paris (Beauvais kaj CDG), Pisa, Poznań, Praha, Pula, Reus, Reykjavik, Ródos, Roma, Salzburg, Santander, Shannon, Sharm el-Sheikh, Sofia, Southampton, Sankt Peterburg, Stockholm, Stornoway, Sumburgh, Szczecin, Tampere, Tenerife, Toronto, Toulouse, Tunis, Venezia, Wick kaj Zürich. Al Dundee rekte de Amsterdam, Antwerpen, Brive, Deauville, Firenze, Jersey, London (City), Luxembourg, Nantes, Paris (Orly) kaj Rotterdam. Detaloj ĉe: skyscanner.net



Aŭte: De Aberdeen 154km/2h32; de Dundee 84km/1h16 (Flughaveno 79km/1h09); de Edinburgo 113km/1h35 (Flughaveno 110km/1h30); de Glasgovo 135km/1h45; de Inverness 138km/1h57. Detaloj ĉe: theaa.com/route-planner



Skota/Tutkelta Kongreso de Esperanto
Pitlochry, 6a-11a de junio 2014

***** PRI VI ***** (* = devigaj kampoj / required fields)

Nomo/Name _____ *

Fam. nomo/Surname _____ *

Naskiĝdato se <14j./Date of birth if <14y. _____

Retadreso/Email address _____

Lando/Country _____

Loĝadreso/Street address _____

Telefono/Phone _____

***** PARTOPRENO *****

Mi alvenos/Arrival date _____ *

Mi foriros/Departure date _____ *

Mi ŝatus kontribui al la programo per _____

Mi manĝas/Meal pref. *

- ĉion/everything
- vegetare/vegetarian
- vegane/vegan
- alie/other _____

***** LOGADO *** (prezoj POPERSONE/prices PER PERSON)**

Mi preferas loĝi en / Accommodation preference *

- Unuhoma ĉambro/single - £69/nokto, £315/tuttempe
- Duhoma ĉambro/double (1 lito) £58/nokto - £275/tuttempe
- Duhoma ĉambro/twin (2 litoj) £58/nokto - £275/tuttempe
- Trihoma ĉambro/triple (3 litoj) £52/nokto - £250/tuttempe
- Familia ĉambro /family room
- Mi memzorgos / atendas informojn pri malmultekostaj opcioj

Mi ŝatus loĝi kun _____

La ejo de la kongreso estos: *Scotland's Hotel and Spa, 40 Bonnethill Road, Pitlochry, Perthshire PH16 5BT, Skotlando*

La loĝadprezoj inkluzivas matenmanĝon kaj vespermanĝon. Limigita kvanto da familiaj/3-homaj ĉambroj, kiuj havas unu grandan liton kaj du normalajn litojn. Infanoj ĝis 5 j. senpage, ĝis 14 j. £10/nokte. Menuo nur pere de la kongresorganizantoj por ricevi ĉi tiujn speciale por ni rabatitajn prezojn. Ni serĉas ankaŭ malmultekostan loĝejon, kaj ni ĝisdatigos la retejon kiam ni havos precizajn informojn. Gejunuloj sub 26 j. rajtas peti subvencion de NoJEF (vidu <http://nojef.org/eo/>). *Se vi por vizo bezonas invitleteron, ĝi estos sendata nur post pago de la kotizo.*

*** PROGRAMO ***

Programkotizo estas £50 por enloĝantoj de la Unuiĝinta Reĝlando aŭ €50 por eksterlandanoj. Ĝi inkluzivas tagmanĝon (supo kaj sandviĉoj) por dimanĉo, lundo, mardo. Rabatoj por programkontribuo laŭ interkonsento kun la organizantoj. Mirindaj ekskursoj estas pretigataj de la organizantoj. Baldaŭ vi ricevos informojn pri ili kaj pri mendebleco.

*** Skota bankedo ***

Ĝi okazos dum tagmanĝo sabate la 7an de junio. Menuo estas pretigata de la organizantoj kune kun la hotelo. Kosto: proks. £20.

Ĉu vi partoprenos la skotan bankedon?

Jes

Ne

*** PAGOJ ***

- antaŭ 28/02/2014: kotiza rabato £10 kaj loĝa rabato £10

- post 30/04/2014: kotiza krompago £5 kaj loĝa krompago £5

- post 31/05/2014: kotiza krompago £10 kaj loĝa krompago £10

Necesas antaŭpagi la programkotizon kaj, se vi mendas loĝadon, minimume 1 nokton.

Mi antaŭpagas per *

UEA (eask-l)

banko (IBAN: GB91 BOFS 8005 6400 8719 39; BIC: BOFSGB21375)

alimaniere (ĉeke al **Scottish Esperanto Association**, kontante, ktp) _____

**Kontaktadreso por ĉia korespondado: Francesco Maurelli,
7/4 Horne Terrace, Edinburgh, EH11 1JL, Skotlando
Telefono: 0044 7883 634423 --- Rete: skotlando@gmail.com**

Kosmopolitaj Notoj

Kelkaj pensoj dum vagado ĉirkaŭ Esperantio

Dum la pasinta(j) jaro aŭ du, mi pasigis iom de la tempo foje vojaĝante, plejofte, sed ne ĉiam, al esperantaj kongresoj kaj aranĝoj. Vojaĝado estas valora en si mem, kaj mi parolas jam pli ol 20 jarojn Esperanton. En 2012 mi entreprenis mian unuan viziton al Universala Kongreso (UK) de Esperanto, kiu en tiu jaro okazis en Vjetnamio. Mi iris ankaŭ ĉi-jare al la UK en Islando, kaj mi revenos al la temo de tiu lando pli poste. Ĝis tiam mi jam ĉeestis plurajn kongresojn ekster Skotlando, kaj eĉ ekster Britio, ekzemple la Italan Kongreson de Esperanto, kiu nun fakte kromnomiĝis la Kvazaŭitala Kongreso, pro la enorma proporcio da ne-Italoj kiuj partoprenas, kaj venadas pro la etoso, la vetero, la kulturo kaj la manĝaĵo, kaj ne nur por paroli Esperanton. Honeste dirite, tamen, kiam mi vizitas Italan Kongreson de Esperanto, ekzistas ankaŭ duonkaŝa kromcelo: praktiki mian ankoraŭ iomete laman kapablon en la itala.

Tamen, reen al la temo Vjetnamio. Bofilino insistis, ke ne estas ekologie respondece, vojaĝi al Vjetnamio por nur unu semajno: "Iru minimume por du semajnoj", ŝi diris. Kaj tion mi ja faris: unue semajno da memstara esplorado de la lando, kaj poste kongreso dum unu semajno. El tiuj du spertoj, la unua, la lando kaj ĝia popolo mem pli impresis. La spektakularaj pejzaĝoj, la vivo (kaj kuirarto) surstrate, la bruoj, la varmo, la pluvo, motocikloj kun tuta familio sur la seĝo, la kontrasto inter tradiciaj loĝlokoj kaj ĵus konstruitaj nubskrapuloj unuj tuj apud la aliaj. Sed en tiu semajno mi certe estis nur turisto, eksterlandano, ne aŭtentika partoprenanto en la kulturo kaj vivo de la lando; nur spektanto, kliento, kaj (relative al ili) riĉulo.

Dum la dua semajno mi kongresumis, kaj ofte ankaŭ pluekskursis, sed kun kunveturantoj de ĉiaj landoj, inkluzive de nia gastiganta lando. Kvankam estis mia unua UK, jam antaŭe mi sciis, ke mi estos inter amikoj, kvankam mi ĝis tiam neniam renkontis la plejmulton el ili antaŭe. Sed eble tio estis parto de la instigo, fine mordi la kuglon kaj enskribiĝi por UK, malgraŭ la malmodera kongreskotizo: mi sciis, ke estos tie ankaŭ homoj kiujn mi jam bone konas.



Vjetnamio: Hanojo, kun bonvenstandardoj en Esperanto

Kaj reveninte mallonge de Azio al Skotlando por celebri mian 60-an jariĝon kun familianoj, mi denove formalaperis, ĉi-foje al la Kvazaŭitala Kongreso en Mazara del Vallo en Sicilio por ĝui la finsomeran sunon de la Mediteraneo, aŭtentikan italan manĝaĵon (ĉu mi jam menciis tiun allogaĵon?), kaj unu-du-foje la **tutnoktan programon** organizitan por distri gejunulojn kaj gejunkorulojn aldone al la porplenkreskula dumtaga programo de eventoj, prelegoj kaj ekskursoj. Fine, sur la revenvojaĝo de Sicilio estis por mi kortuŝa sperto viziti amikojn kaj najbarojn de nia karmemora David Kelso en vilaĝo apud Melito di Porto Salvo en Kalabrio kie li havis hejmon.

En januaro ĉi-jare, tamen, eksterlando venis ĉi-tien, en la formo de esplora vizito de reprezentantoj de kelkaj aliaj eŭropaj E-organizoj, kadre de la Grundtvig-programo de la EU. Plej plezure estis partopreni kun esperanto-parolantoj el Danio, Italio, Islando, Slovakio, Pollando kaj Germanio en publika Burns-festo por nia nacia kaj internacia poeto, kaj prezenti al ili nian trinkajn kaj manĝajn frandaĵojn, inkluzive de la "ĉef-ĉefulo de la klan' kolbasa" (laŭ la vortoj en la esperanta traduko far Reto Rossetti), hagiso, en vegetarana kaj karnovorula versioj.

Post tiu kunveno, oni invitis min prelegi en la lando de la fama dana aŭtoro kaj edukisto Grundtvig mem, ĉe la jarkunveno de la Dana

Esperanto-Asocio en Kopenhago. por klarigi al ili kio okazas en Skotlando, pri la venonta referendumo, kaj la fonon malantaŭ lastatempaj (kaj malpli lastatempaj) eventoj ĉi tie. Kompreneble, mi havas propran vidpunkton pri ĉi tiu temo, kaj mia prezento ne estis senpartia sed senhonte jesema, sed kompreneble, la ideo ke lando kun 5 milionoj da enloĝantoj havu plenpotencan registaron ne povas esti stranga ideo en la lando de **Borgen** kaj la (bedaŭrinde, fikcia) ĉefministro / eksĉefministro Birgitte Nyborg (kaj ŝiaj realaj ekvivalentoj). Dank' al miaj danaj gastigantoj, mi povis viziti la gravajn vidindaĵojn de Kopenhago, inkluzive de **Borgen** mem, kaj eble ĝia filozofia malo, la "sendependa" anarkiista kvartalaŝtato **Christiania**, ne tre for de la haveno de la dana ĉefurbo.



Danio: Christiania kaj loka esperanto-parolanto Bent

Post mia vizito al Danio, mia sekva esperanta ekskurso al eksterlando estis en majo, al la brita kongreso en la angla havenurbo Ramsgate, (eble tro) malstreĉa afero apud la maro, kun bonvena procentaĵo da eksterlandaj gastoj, kaj klerigaj kontribuoj al la programo interalie de gastpreleganto Katalin Kovács, kaj agrable kvieta jarkunveno en kiu Prof-o John Wells, la emeritiĝanta prezidanto de la brita e-asocio, ricevis festkukon, kaj transprenis la batonon de li D-ro Paul Gubbins.

Tuj poste mi forflugis al la 90a Germana Kongreso de Esperanto en Nurnbergo, hejmo de la unua esperantlingva gazeto, kaj la urbo kiu donis al la mondo la klarneton, la MP3-ludilon, la paperan naztukon,

la fluoreskan markilon, kaj eŭkaliptajn bombonojn. Kaj Nurnbergo estas ĝemelurbo de Glasgovo. Niaj skotaj samideanoj David kaj Jean Bisset transdonis la oficialan salutmesaĝon de la urbestro de Glasgovo al la urba konsilantaro de Nurnbergo ĉe oficiala akcepto en la histoririĉa urbodomo.



Nurnbergo: David kaj Jean Bisset transdonas salutojn

Ankoraŭ alia alta punkto de la kongreso estis por mi pensiga prelego de Humphrey Tonkin pri "Esperanto, klarvido, kaj la lecionoj de la historio", en kiu li meditas "pri la grado ĝis kiu la malnovaj argumentoj por Esperanto plu validas, kaj la grado ĝis kiu ni devas reripensi nian pasintecon por pli bone fronti nian estontecon". La konkludo estis klara por tiuj kiuj pretis agnoski lian trafan pledon "fariĝi realismaj" (angle "get real"): ni frontu la estontecon, kaj modernigu nian mesaĝon, aŭ ni malaperos. La prelego haveblas en la reto:

<http://www.youtube.com/watch?v=loEVZ5wDUgs>

se vi volas mem spekti.

Bedaŭrinde liaj vortoj ŝajne ne penetris la lignajn kapojn de la partianoj de EDE, stulta projekto por esperanta politika partio, kiu varbis ĉe la Germana kongreso, kaj kies sola programo estas senĉese postuli, ke la EU "oficialigu" Esperanton, sed ĝiaj anoj eĉ ne rekonas la bezonon unue traduki la koncernajn terminarojn por pli praktike antaŭenigi la ideon. Ja la Katalunoj kaj la Eŭskoj jam faris tion, kaj iliaj landoj ankoraŭ eĉ ne estas membroj de la EU. Plej grave, la febla nombro da voĉdonoj, kiun ricevas EDE nur ridindigas nin.

En Skotlando en junio estis nia 108a skota kongreso de Esperanto, por kies okazo kaj sukceso ni devas danki al nia tiama prezidanto

David Hannah, kiu majstre solvis krizon kiam la posedantoj de nia unta kongreshotelo decidis fermi la hotelon por renovigo nur semajnojn antaŭ la kongreso. Stelulino de la kongreso estis ankaŭ nia hungara gasto Veronika Poór kiu regalis kaj edukis nin per serio da prelegoj. Ne estis ĉio studado kompreneble: agrabla manĝaĵo, bone stokita drinkejo, eksterlandaj gastoj, kaj agrabla malstreĉiga vojaĝo en kanalboato ĉiuj kontribuis al la etoso de la kongreso.



Nia apudkanala kongresejo en Linlithgow

En julio, estis mia plezuro viziti la orient-eŭropan landon Litovion por agrabla kaj impona internacia esperanta evento, la ĉiujaraj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) okazintaj en 2013 en la litova nordorienta urbeto Utena. Tio donis al mi la eblecon iomete esplori plurajn aliajn regionojn de tiu lando kun la helpo de lokanoj antaŭ kaj post BET. En Kaunas, la dua urbo laŭ grandeco, mi vizitis la bogepatran domon de Zamenhof, kiu nun servas kiel ĉefsidejo de la litova e-asocio; en la ĉefurbo Vilnius mi vidis la kortuŝajn ejojn de la okazaĵoj de 1990-91, post la redeklaro de Litovio, kun siaj 3 milionoj da enloĝantoj, kiel sendependa lando denove. Dum la kongreso mem estis ekskursoj kaj ĉiuvespera kultura programo. Mi prelegis en la kongresa "somera universitato", interalie pri la historia fono kaj politikaj evoluoj malantaŭ la alproksimiĝanta ebleco de skota sendependiĝo.



**Litovaj folkloraj dancistoj; sidejo de la Litova EA;
kongresa prelego; kaj postprelega "soifo"**

Partoprenis la kongreson pli ol 200 esperantanoj el pli ol 20 landoj. Se vi neniam estis en tiu parto de la mondo (kaj eĉ se jes), mi forte rekomendas al vi BET. Mi devas gratuli la kongresteamon sub la senlaca kaj profesia gvidado de prezidanto de LEA, Povilas Jegorovas, pro mirinde ampleksa kaj bone organizita kongreso. Mi atentigu, ke en nia kalendaro sur la lasta paĝo de ĉi tiu numero estas aliĝdetaloj por la BET de 2014, kiu okazos en la urbo Jelgava en la najbara lando Latvio, kaj kiu estos la 50a jubilea BET.

Post BET, mi ĉeestis la Universalan Kongreson en Islando, unike interesa kaj frapa vizitocelo. Ankoraŭ alia sendependa lando, ĉi-foje kun nur 300.000 da enloĝantoj, kun interesa historio, pli mallonga ol nia, kun multe da malavantaĝoj, pli izolita, pli norda, kun malpli da naturaj rimedoj, Islando sendependiĝis laŭgrade de siaj danaj regantoj: en 1874, iom da malcentraliĝo, ricevo de kelkaj rajtoj; en 1904, ili ricevis pli da potencoj, kaj en 1918 plena sendependiĝo, kvankam teritorio ankoraŭ regata de la dana reĝo laŭ traktato de unuiĝo kiu estos eksvalidiĝonta

laŭplane post 25 jaroj; en 1944, Islando fariĝis respubliko. Lastatempe, Islando montriĝis interesa modelo de politika demokratio pro sia rifuzo solvi ekonomian krizon en maniero kiu kaŭzus suferon al la ordinaraj islandanoj, kaj pro sia enkonduko de diversaj leĝoj pri inaj rajtoj. La kongreso de Esperanto havis ankaŭ multajn interesajn erojn, por ne menciigi mian prelegon pri la ebleco de skota sendependiĝo. Unu el la kongresaj ekskursoj estis flugo al Gronlando, kiu situas kelkcent kilometrojn nordokcidente de Islando. Gronlando estas ankoraŭ "posedaĵo" de Danlando, sed ĝi ĝuas kelkajn potencojn de memregado, kaj en 1975 rajtis ekŝiĝi de EU.




Islando: Francesco kaj Sara varbas tartane por la Skota Kongreso kun pola amikino Nina Pietuchowska

Tiuj vagadoj tra la mondo kaj tra Esperantio donis al mi la instigon cerbumi pri la celo kaj etoso de la lingvo Esperanto. Jen la vera spirito de Esperanto: kosmopolitismo. Forgesu pri "fina venko", "prceloj" kaj aliaj internen-rigardantaj ismoj. Esperanto ne sukcesos se ĝi ne sukcesas fariĝi bunta tutmonda komunumo alloga kaj bonvenigema al ĉiu kiu dividas nian amikeman kosmopolitan etoson. Por lerni lingvo(j)n devas havebli nek abstrakta idealo, nek prozelitumanta fervoro, sed konkreta kialo kiu allogas homojn al partoprenado. Jen kial ni organizu kongresojn.

Ed ROBERTSON

Green supernova in a night sky

Paul Gubbins (ed.): **"Star in a Night Sky: An Anthology of Esperanto Literature"**, Francis Boutle Publishers, London



In the 125 years of its existence Esperanto has produced a formidable literature, punching way above its weight, certainly in terms of quantity, and more than occasionally in quality. The purpose of this volume is to introduce this treasure to a wider audience, both in the original Esperanto and translated into English. This compilation, edited by Paul Gubbins, himself a contributor to Esperanto's literature, is the fifth volume in a series on the literatures of the "lesser used languages of Europe", the first four volumes being on Breton, Manx, Galician and Channel Islands French.

From time to time items of Esperanto's original literature are translated into English; more often the translation is in the opposite direction. Mostly, it is Esperanto into English that we are concerned with in the collection here. There are however some of the more famous English-language texts translated into Esperanto which have been included, such

as the soliloquy from Shakespeare's *Hamlet*. In some cases, the translations had already been produced; for many others the translations were done specially for the anthology.

The entire period from Esperanto's beginnings in 1887 up to the present day is covered, from the *Fundamento* to the most recent publications, and part of the aims of the book are to tell the story of Esperanto from its birth, of its hopes and aspirations, its development and maturity, its persecution under fascism, to its acknowledgement as a literary language as attested by its candidates for the Nobel Prize in Literature. Esperanto's scope is, of course, worldwide, and there are contributions from authors all over the world throughout the volume, including from Scotland our own Reto Rossetti, Bill Auld, Albert Goodheir and David Kelso.


The word "literature" perhaps does not do justice to the vast range of material available in Esperanto. Esperanto is, of course, a living language which has been used throughout its existence for every imaginable purpose. *Star in a Night Sky* contains examples of a wide range of literature in the widest sense, not just such creations as would be referred to in Esperanto as *beletro*.

There are poems, extracts of plays and novels, scientific articles, humour, polemic, history, cookery, travelogues, politics, you name it, but of these the coverage of Esperanto's literature here is comprehensive and fully illustrates its range. Reviewing a collection one can always, of course, quibble about the the jewels that have been left out; for example, there is no example of John Francis's writing, to my mind a glaring omission, but apart from that, it is at least pretty much all included: the good, the very good and, if not the bad, the indifferent has also got a place here too.

But this collection is not just an anthology or a catalogue. It is a bilingual reader, much more than a complete introduction to Esperanto life, language, literature and culture; all you need to get to know Esperanto. If you want to give someone a complete introduction to Esperanto, or even get further into it yourself, this is the book for you. The best Esperanto book I've read for a long time.

Ed ROBERTSON

A *Fundamento* doesn't make a language



Alan Reed Libert & Christo Moskovsky: "Aspects of the Grammar and Lexica of Artificial Languages", Peter Lang, Frankfurt

Scholarly treatment of constructed language projects is always welcome, and this study deals with several dozen "artificial language" (AL) proposals. There have been many hundreds of these, but this work is not a catalogue. It has other strengths: objectivity, use of modern linguistic categories and reasoning, and inclusion of both older and more recent projects. This is refreshing because often much written on planned languages is tendentious, banal, lacking in academic rigour, and rehashing arguments from a century ago. This study explores 14 sample aspects of phonology, orthography, morphology, syntax and lexicon, covering areas as diverse as stress systems, indirect objects and vocabulary relating to the weather. So let's just take these last three as examples.

Stress: The authors note that a simple rule for stress is a popular choice for ALs. Things aren't so simple in real life. Yes, while it is true Esperanto's

stress is in principle on the penultimate syllable, Libert and Moskovsky's description omits some vital details. This arrangement isn't so handy in songs and poetry, so Esperanto copes with this by the elision of final *-o* in nouns and the *-a* of the article where useful to do so, and this is even part of Esperanto's original prospectus, the *Fundamento*.

Unlike all of the language projects described here (and not here), Esperanto is a living language. It has developed secondary stresses in multi-syllabic roots. More importantly, in words compounded from multiple roots, the roots are themselves sometimes stressed individually for ease of listeners' comprehension. You don't read about that complication (which paradoxically makes understanding easier) in standard grammar books, but it is a natural process that all fluent or native speakers of Esperanto engage in automatically.

Indirect objects: Indirect objects are entities indirectly affected by an action in the sentence, according to the traditional grammar of 50 years ago, now replaced by analysis of the sentence into arguments and dependencies, or by analysis into hierarchical constituent parts, according to which theoretical camp one belongs to. (Personally, I prefer the dependency approach). 'Indirectness' is an arbitrary concept which varies from language to language, and which does not feature at all in some languages. Such details fail to trouble most amateur AL designers, and their creations tend to model themselves on existing source languages or on personal whims.

A century ago, Esperanto started off as an amateur creation, and used to be like this too. Early Esperanto original prose texts often seem clumsy or translated. The coming to life of Esperanto as a real language in the early years of the 20th century changed all that. With input from thousands of speakers from different language backgrounds, a whole range of different possible structures evolved in Esperanto for showing the roles of the arguments of each sentence alongside the verbs that supported them, and yet all of them were permissible because of Esperanto's open source philosophy, its initiator consciously taking a bit of a back seat, and with his early death in 1917, soon no longer being around at all. Thus Esperanto, unlike all other planned languages, acquired the flexibility, scope for nuance, and expressiveness of a real language.

Weather vocabulary: So too in its lexicon Esperanto differentiates itself. Soon Esperanto had little need for committees of experts to deal with vocabulary matters. New words now arise in Esperanto in the same way as in all other living languages: somebody uses a new word, and it either catches on or it doesn't, the opinion even of the *Akademio* mattering little in the process. Libert and Moskovsky give some examples of the scope of meteorological vocabulary in various ALs. Amusingly this section reveals the total inadequacy of *a priori* languages like Ro for dealing with such needs: "bifkac" = cirrus; "bifkad" = cumulus; "bifkaf" = stratus; "bifkal" = nimbus, each cloud type ending in a different letter. The English Wikipedia page on cloud types lists 47 types of cloud, all easily rendered into Esperanto by a lay speaker. For speakers of Ro, if there ever were any other than the Rev. Edward P. Foster (the inventor) and his wife, there is a rather fundamental problem (in addition to the words sounding too similar): Ro has 19 consonants to choose from to end a word with, not 47. In 1961, Maurice Lewin published a list of meteorological terms used in Esperanto. It had nearly 1500 entries. Such a list today would be much bigger.

In summary, an interesting publication, maybe not worth the arm and a leg (£32) demanded by its prestige academic publisher, but certainly worth a few quid for a look at on inter-library loan. My biggest problem is with the word "artificial". Clearly, Esperanto is in a different category. What is being described here are projects, proposals, experiments, not real languages, and it is high time we, Esperanto's adherents, stopped thinking of ourselves as belonging in the same category. Esperanto is not planned, it WAS planned, in the 1880s. Esperanto is not artificial, or a cut-down code for idiots (despite the wishes of the *bonlingvistoj*). It's a real language that works like any other. The only difference is that (with a little bit of effort) fluency can be achieved 5 to 10 times more quickly than with any other language. That doesn't happen merely by publishing a *Fundamento*, however well thought out. All sorts of other circumstances have to co-operate, like acquiring enough speakers in enough countries to fill in the gaps and bring the language to life. This has only ever happened this once.

Ed ROBERTSON

El la redakcia rubujo

Ŝafisto kondukis sian ŝafaron al fora paŝtejo, kiam subite tute nova BMW-aŭto rapide alproksimiĝis el polvonubo al li. La veturanto, juna viro en Broni-kompleto, Gucci-ŝuoj, Ray-Ban-sunokulovitroj kaj Yves-Saint-Laurent-kravato, kliniĝis el la fenestro kaj demandis al la ŝafisto "Se mi diras al vi precize kiom da ŝafoj vi havas en via aro, ĉu vi donos al mi unu el ili?" La ŝafisto rigardis la junriĉulon, kaj tiam rigardis al sia kviete sinpaŝtanta ŝafaro, kaj kalme respondis "Certe".

La junriĉulo parkumis sian aŭton, aperigis sian Samsung Galaxy tabulkomputilon, kaj krozis al la retpaĝo de NASA, kie li konektis sin al GPSa satelita loktrova sistemo, kiu skanis la regionon, kaj li malfermis datenarbazon kaj OpenOffice-kalkultabelon kun kompleksaj formuloj. Tuj la komputilo produktis grandan PDF-dokumenton, kiun la junulo trafolumis ĝis la lasta paĝo, kaj li turnis al la ŝafisto, kaj diris, "Vi havas precize 1586 ŝafojn".

"Prave. Prenu unu el la ŝafoj", diris la ŝafisto. Li observis la junulon elekti unu el la bestoj kaj ŝovi ĝin en la aŭton. Tiam la ŝafisto diris: "Se mi kapablu diri al vi ekzakte kio estas via laboro, ĉu vi redonus al mi mian beston?". "Okej, kial ne?", respondis la junulo.

"Klare, vi estas konsultisto", diris la ŝafisto. "Tute prave", respondis la junriĉulo, "sed kiel vi divenis tion?". "Divenado ne bezonatis", respondas la ŝafisto. "Vi ekaperis ĉi tie senaverte, kvankam neniu petis de vi viziton. Vi atendas pagon por respondo kiun mi jam sciis, kaj vi scias feknenion pri mia laboro ... Nun redonu al mi mian hundon".

Riĉulo decidis entrepreni safarion en Afriko. Li prenis kun si sian fidelan dorlothundon por kunesto. Unu tagon, la hundo komencas ĉasi papiliojn kaj postnelonge, la hundo ekkonscias, ke li perdiĝis.

Do, ĉirkaŭvagante li ekrimarkas leopardon kiu celas rapide al li, kun la evidenta intenco lunĉi. La hundo pensas: "Ho ne! Mi estas nun

profunde en la fekaĵo!". Tiam li ekrimarkis kelkajn ostojn surgrunde tre apude, kaj tuj ekronĝas ilin, kun la dorso al la alproksimiĝanta karnovorulo.

Tuj antaŭ ol la leopardo eksaltos, la hundo ekkrias laŭte: "Vaŭ, tio estis bongustega leopardo. Mi demandas al mi, ĉu estas pluaj da en la apudaĵo?".

Aŭdinte tion, la leopardo haltas sian atakon mez-paŝe, kaj timmieno aperas sur la vizaĝo, kaj li ŝtelrampas for inter la arbojn. "Fuu", diras la leopardo. "Tio estis apenaŭa eskapo. Tiu hundo preskaŭ kaptis min".

Dume, simieto, kiu rigardis la tutan scenon el apuda arbo, kalkulas, ke li povas bone uzi tiun scion, kaj negoci kontraŭ ĝi protektadon de la leopardo. Do, li ekforiras. Sed la hundo vidis lin celi rapide al la leopardo, kaj konstatas, ke io estas.

La simieto baldaŭ atingas al la leopardo, malkaŝas la faktojn, kaj traktas interkonsenton por li kaj la leopardo. La leopardo furiozas, ke la hundo igis lin idioto kaj diras, "He, simieto, eksaltu sur mian dorson, kaj vi vidos kio okazos al tiu damninda hundaĉo".

Nun la hundo ekvidas la leopardon, kiu venas kun la simieto surdorse, kaj ekspensas: "Kion mi faru nun?". Sed anstataŭ forkuri, la hundo eksidas kun la dorso al la atakontoj, ŝajnigante, ke li ne vidis ilin ... kaj tuj kiam ili sufiĉe alproksimiĝis por aŭdi, la hundo diras: "Kie estas tiu damninda simieto? Mi povas neniam fidi je li. Mi forsendis lin antaŭ duonhoro por venigi pluan leopardon, kaj li ankoraŭ ne revenis!!".

Du piratoj, ambaŭ kun po okulflikaĵo, staris sur marponto. Unu demandis al la alia, "Kiel vi perdis vian okulon?".

"Nu, mi promenis laŭ ĝuste ĉi tiu marponto, kaj venis mevo, kaj fekis sur mian vizaĝon!".

"Ĉu vere? Kaj pro tio vi perdis okulon?".

"Aaa, nu, en tiu tago mi ĵus ekhavis mian hokon".

Kalendaro



7. - 9. marto 2014: *Lernu!* Weekend course for beginners and post-beginners at Shallowford House Staffordshire ST15 0NZ, accommodation and meals all inc. £99. Samtempe kun *Drondo*, la populara diskut-rondo por progresantoj kaj progresintoj, £140. Info: [//esperanto.org.uk/eab/eab_events/2014-03-07_shallowford.htm](http://esperanto.org.uk/eab/eab_events/2014-03-07_shallowford.htm)

26. - 28. marto 2014: Three-day symposium hosted by the University of Liverpool with seminars on Esperanto linguistics, literature and language. Info: [//esperanto.org.uk/eab/eab_events/2014-03-26_liverpool.htm](http://esperanto.org.uk/eab/eab_events/2014-03-26_liverpool.htm)

5. - 10. aprilo 2014: 7-a Mezorianta Esperanto-Kunveno - en Tbilisi, Kartvelio. Belega lando, bonega etoso. Prelegoj, ekskursoj, artaj aranĝoj! Info: mezorianta.kunveno@esperanto.org, [//uea.org/vikio/Alighinformoj_-_2014](http://uea.org/vikio/Alighinformoj_-_2014)

18. - 21. aprilo 2014: 95th British Esperanto Congress in Sheffield. Sign up online at [//esperanto.org.uk/eab/eab_events/bk2014_payment.htm](http://esperanto.org.uk/eab/eab_events/bk2014_payment.htm)

6. - 11. junio 2014: La 109-a Skota Kongreso de Esperanto kaj samtempe la Unua Tutkelta Kongreso okazos en Pitlochry. Info: [//www.skotlando.org](http://www.skotlando.org) . Pliaj informoj kaj aliĝilo sur paĝo 22.

28. junio - 5. julio 2014: 50-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, Jelgava, Latvio. Kursoj, Somera Universitato, ekskursoj, filmoj, kantoj, dancoj kaj multo alia. Info: [//esperanto.lv/index.php/lang-eo/la-50-aj-baltiaj-esperanto-tagoj-bet-50](http://esperanto.lv/index.php/lang-eo/la-50-aj-baltiaj-esperanto-tagoj-bet-50)

6. - 11. julio: 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio, Rijeka, Kroatio. Inf.: [//www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=399&filename=informilo-rijeka34.pdf](http://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=399&filename=informilo-rijeka34.pdf)

26. julio - 2. aŭgusto 2014: 99-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Buenos Aires, Argentino. Info: [//www.uea.org/kongresoj/](http://www.uea.org/kongresoj/) EAB-membroj kapablas pagi kongreskotizojn en britaj pundoj pere de la oficejo de EAB.

23. -30. aŭgusto 2014: 81-a Itala Kongreso de Esperanto, Fai della Paganella, Trentino, Italio. Prelegoj, ekskursoj, koncertoj, nokta programo, kunesto, seminarioj. Kongresa temo: Esperanto kaj novaj teknologioj <http://kongreso.esperanto.it/81/?lang=eo>

POR PLI DA EVENTOJ, VIDU: <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>